

SDRA

QUANCO

4/02

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio
(4/2002)
Aperas 4 foje jare

Eldonas:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonoj: ++53(7)53 9102
kaj 40 4484
Fakso: 33 8729
Retadreso:
kubesp@enet.cu

Ĉefredaktoro:
ALBERTO GARCÍA FUMERO

Revizias kaj kontrolas:
MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Enpaĝigo:
ALBERTO FDEZ-CALINES BARRIOS

Prezo: (enlande) CUP 1.00
(eksterlande), EUR 2.00
aŭ 2 irk., pagendaj al la
UEA-konto: keax-u.
Ĉiuj rajtoj rezervitaj
Reproduktado permesata
(bv. indiki la fonton kaj
sendi du ekzemplerojn al
la Redakcio).

Interŝanĝo dezirata.

La kovrililo:
D-ro L. L. Zamenhof (1859-
1917). *Esteban Valderra-
ma, paŝtelo, 1917. Portre-
to aperinta en Latinamerika
Esperantisto, Oficiala Or-
gano de Societo Kuba por
la Propagando de Espe-
ranto kaj de Latinamerika
Esperantista Ligo (n-ro 2,
februaro 1917).*

estimataj

Jen la jarfino. Sed atentu, tio ne signifas ke finiĝis laboro, des malpli hasto.

Multaj estas la taskoj farendaj dum la nova jaro, komence per la Komitatkunsido, kaj la preparoj (neniel tro frue!) por la 6a Tutamerika Kongreso de Esperanto en 2004...

Bone, pri tiu ĉi Avanco: la enhavo estas sufiĉe riĉa. Ni havas la plezuron prikomenti valoran poemaron de samideano, (bedaŭrinde en la hispana!), kaj tiu malnova amiko samtempe artikolas sur niaj paĝoj pri nia Nacia Heroo José Martí; Julián saĝe konsilas al ni pri manieroj plifortigi niajn agadojn; du senlaciaj veteranoj – veraj legendoj –, rakontas pri la unuaj tempoj de nia movado; nia prezidantino bilance kaj resume pensigas nin pri la estonteco; PIVULO ankoraŭ helpas nin orientiĝi en la gramatikaj labirintoj...

Nu, nome de la tuta teamo mi deziras al vi sukceson kaj feliĉon dum 2003!

Plezuran legadon!

Via ĉefredaktoro,
Mag. ALBERTO GARCÍA FUMERO

enhavo

<i>Survoje al disvastigo</i> JULIAN HERNÁNDEZ ANGULO	3
<i>Novjara saluto de la prezidantino de KEA</i> MARITZA GUTIERREZ	4
<i>Alproksimiĝo al la politika penso de José Martí</i> JUAN LAZARO BESADA TOLEDO	5
<i>Por daŭra perfektigo de niaj aranĝoj</i> JULIAN HERNÁNDEZ ANGULO	9
<i>Vidalvide kun... Julio Martínez kaj Andrés Rodríguez</i> ALBERTO GARCÍA FUMERO	10
<i>Plia E-fako en biblioteko. Ĉiŝoj en Guantánamo</i> RAUL SANCHEZ GUILARTE	12
<i>Recenzo: Memdialogo</i> TINEO	13
<i>Zamenhof aŭdigis en Yacabo ĉemare</i> MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ	14
<i>Angulo de la duboj: Kuŝe, side kaj ...</i> PIVULO	15

Survoje al disvastigo

La disvastigo de Esperanto iomete malfacilas en la nuntempo, sed ĝi estas farenda kaj farebla tasko de ĉiuj estraranoj kaj aktivuloj ĉar se ne estas tiel, ni riskas perdi kion ni jam atingis tiurilate.

Pro la fakto ke la naciaj estraranoj de la Asocio ofte meditas kaj analizas la efikon de sia laboro en tiu ĉi grava agadkampo, oni decidis proponi al naciaj, provincaj kaj municipaj estraranoj la jenan strategion, tiel ke nia movado daŭre progresu kvante kaj kvalite kaj atingu superajn celojn, kiuj plaĉos al ĉiu vera kaj tulkora esperantisto kie ajn en nia lando. Jen la diversaj eroj de nia strategio:

- Unue ni analizu pasintjarajn membro-kontrolojn kaj taksu la esperantistan potencialon de la teritorio por elekti tiujn esperantistojn kiuj pro sia profesio, aĝo, edukiteco kaj personaj trajtoj povus helpi kaj kunlabori. Ĉu per persona konversacio, ĉu per bona letero, ni invitu kaj spronu ilin reaniĝi. Ni prenu en konsideron tiujn atingeblajn per telefonon tiel ke la kontakto estu kiel eble plej rapida.

- Ni ne lasu ke novbakitaj aŭ veteranaĵaj esperantistoj perdu la ligojn kun la Asocio. Pro tio, ni ofte devos komunikiĝi kun ili per diversaj rimedoj. Ni multobligu kaj sendu al ili periodajn informojn, gravajn artikolojn kaj aliajn materialojn kiel revuojn, raportojn, aranĝo-programojn, ktp. kaj leterojn, telegramojn kaj kartojn okaze de gravaj datoj.

- Ni invitu niajn membrojn partopreni niajn kunsidojn, aranĝojn, renkontiĝojn. Ni ebligu al ili gustumi la esperantistan etoson, ni dividu kun ili niajn esperantistajn spertojn kaj travivaĵojn. Ni ankaŭ invitu familianojn, amikojn kaj kolegojn, tiel ni varbas novajn

membrojn. Ni ne forgesu, ke inter nia membraro estas kelkaj, eĉ multaj kelkfoje, kiuj ne vere scias kio estas Esperanto kaj ties valoro, kaj ju pli ni ligas ilin kun la internacia kaj nacia vivo de la movado, des pli ili esperantistiĝas. Ili ja konstato, ke Esperanto povas agrabligi iliajn vivojn, ke Esperanto povas nutri ilin spirite, ke ĝi povas doni iun sencon al ilia ekzisto. Se ni forgesas nian membraron kaj ne rilatiĝas kun ili, nia membraro ne rilatiĝos kun la asocio kaj forgesos nin. Malgraŭ malfacilaĵoj de la nuntempa vivo, malgraŭ personaj problemoj, estraranoj kaj aktivuloj de la asocio ne povas perdi tiun perspektivon. Ni atentu kaj stimulu niajn instruistojn, niajn artistojn, niajn aktivulojn, kaj en specialaj kaj altsignifaj datoj, ni montru nian ĝisdetalan atenton al ili. Detaloj grandigas kaj sukcesigas aferojn, ne gravas se oni elspezas iom da mono, oni ĉiam pensu ke temas pri mono bone elspezita.

- Ni pliriĉigu niajn kontaktojn kun radio-kaj televidstacioj, ĵurnaloj, gazetoj, bibliotekoj, kulturdomoj, ktp. Pere de la naciaj kaj lokaj amaskomunikiloj, ni povas informi al nia membraro kaj al la ekstera publiko pri niaj kursoj, aranĝoj kaj gravaj aferoj, ni povas alvoki la eksteran publikon alproksimiĝi al Esperanto kaj partopreni la vivon de la Asocio. Pere de bibliotekoj, kulturdomoj kaj alispecaj kulturejoj, ni povus eksterigi nian agadon kaj pliriĉigi nian kulturan agadon. Ni organizu ekspresajn kursojn, ni prelegu pri Esperanto, ni aranĝu ekspoziciojn... Ni daŭre ŝovu nin en la kulturan vivon de la komunumo, ni ne enfermiĝu en la verdaj muroj de la Asocio.

Disvastigo ĉefe eblas kiam oni rilatiĝas kun la ekstera mondo. Ni evitu kontakti la eksteran mondon nur dum enskribiĝoj por la kursoj, nia kontakto kun la publiko okazu dum la tuta jaro.

• Fine mi deziras fokusigi la atenton de ĉiu estrarano kaj aktivulo rilate nian laboron. Bona estrarano ĉiam konscias, ke la plej grava kaj supera celo estas Esperanto. La esperantista agado, kiel ajna agado, igas nin kelkfoje diskuti kaj ne interkompreniĝi, sed tio neniam povos igi nin malamiĝi kaj senfratiĝi. Ni ne estu obstinaj, ni ne blinde klopodu trudi niajn personajn opiniojn se ili iamaniere povus vundi niajn samideanojn kaj bremsi la efikan laboron.

Pravon al kiu pravos. Bona estrarano ĉiam flegas sociajn rilatojn kaj klopodas nek

vundi nek damaĝi kunlaboranton por eviti ties apartiĝon. Bona estrarano ĉiam estu kiel eble plej tolerema kaj komprenema kaj bone rilatiĝu kun la membraro aŭskultante kaj konsilante kvazaŭ patrino aŭ patro. Bona estrarano planas, organizas kaj efektivas taskojn engaĝigante kaj prenante ĉiujn en konsideron laŭ iliaj trajtoj, tiel ke ili pli aktive partoprenu la asocian vivon. Li aŭ ŝi ĉiam optimizmas, neniam injektas pesimismon nek venenigas la animon de la membroj. Bona estrarano ĉiam estu la unua en la laboro.

La vojo al disvastigo de nia movado plejnas je detaloj kaj niaj travivaĵoj kiel gvidantoj de la asocio daŭre instruas al ni, ke ni ne rajtas preteratenti ilin se ni deziras ke nia movado disvastiĝu.

JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO

Novjara saluto de la prezidantino de KEA

Karaj gesamideanoj,

Tiu ĉi numero de *Avanco* estas la lasta de la nuna jaro kaj kvankam ne ĝustatempe aperigita, ĝi atestas pri la laboro de teamo engaĝita en la celoj kaj taskoj de nia Asocio. Kompreneble, ni ne kontentas pri la aperitimo de nia organo kaj daŭre alstrebus estontece plibonigi tiun ĉi taskon.

Mi volas ankaŭ emfazi ke por bona progreso kaj efika laboro ni devas bone atenti ĉiujn laborferojn, sed ni ne povas preteratenti ke KEA, samkiel la tutmonda esperantistaro, havas prioritatojn, esence en la informa, instrua kaj utiliga fakoj. Nia oficiala organo *Avanco* devas fariĝi ĉies tribuno kaj diskutejo por plibonigi la laboron. Ni klopodu organizi klubojn por legado de *Avanco* kaj aliaj materialoj, verkado k.s., por utiligi la lingvon en diversaj fakoj kaj profesioj.

Vi estas niaj pilieroj tra la tuta lando kaj de via laboro, iniciatemo kaj kunlaboro dependas la vivo de la kuba movado: kiu havas antaŭ si plurajn eventojn por la jaro 2003 kaj 2004.

Sed ni bezonas bone preparitajn esperantistojn kun bona regado de la lingvo kaj kunlaborema spirito. Tiuj estas esencaj kvalitoj por nomi sin Esperantisto.

Ni laboru por ke la jaro 2003 marku novan startpunkton en nia strategia laboro. Ni preparu niajn samideanojn kaj preparigu mem por sukcesigi la venontjara laborplanon.

Mi volas profiti la okazon por transdoni al vi, ankaŭ nome de la Nacia Estraro, plej elkorajn bondezirojn, sanon kaj prosperon en la nova jaro.

Samideane,

Maritza Gutiérrez González

Alproksimiĝo al la politika penso de José Martí

Paroli pri evoluo de la politika penso en Kubo, nepre kondukas al la figuro de tiu kiu estas la plej kontinenta reprezentanto de la latinamerika intelektularo en la 19-a jarcento: José Martí.

Ĝuste tial ni dediĉas ĉi tiun prelegon¹ al prikonsidero – eĉ se limigita, se oni prenas en konsideron la tempon kiu estas je nia dispono – de la politikaj direktoj de lia pensado, ĉar Martí ludis gravegan rolon ne nur en la historio de nia lando, sed ankaŭ en tiu de la tuta Ameriko.

Naskiĝinte en 1853, kiam ĉiuj landoj de Latinameriko, escepte de Portoriko kaj Kubo estis atingintaj la liberecon de la eksa metropolo, t.e. Hispanio, li suĉis jam en la infanaĝo kaj adoleskaj jaroj, la ventoblovojn de la sendependecaj ideoj, kiuj venis el la francaj enciklopediistoj – prapatroj de la Revolucio de 1789, samkiel de la liberigaj ondoj de ĉiuj latinamerikaj landoj, kies ĉefa reprezentanto estis Simón Bolívar, la universala venezuelano pri kiu Martí skribis kortuŝajn vortojn en la libro *La Edad de Oro*, kiun nia heroo dediĉis al la infanaro de Ameriko.

Tamen, ne nur tiuj fontoj nutris la personecon kaj idearon de Martí. Jam ekde la fino de la 18-a jarcento, en nia lando aperis tuta fasko da intelektuloj, kiuj kontribuis al formigo de la kuba konscienco, iom post iom maturiĝinta.

Ne eblas ĉi tie ne mencii la nomon de pastro José Agustín Caballero, (1771-1835), kies pedagogia apostolado donis abundajn fruktojn, el kiuj la plej suka estis

alia pastro, nome Félix Varela (1778-1853). Pri ĉi tiu lasta oni devas diri, ke estis li kiu instruis la kubanojn pensi. Li estis vera kontraŭulo de aneksiismo kaj lia sopiro al la universaleco igis lin pledi por ĉesigo de sklaveco, kiun li konsideris fremda al la humanismo kaj al la homa naturo.

Ne malpli gravan rolon ludis la pedagogo kaj filozofo José de la Luz y Caballero, (1800-1862). Estis li – almenaŭ laŭ mia persona juĝo – kiu edukis kaj influis plej profunde la karakteron kaj idearon de ĉiuj forĝantoj de nia sendependigo el Hispanio, pro lia penso de profunda kuba radiko.

Tamen, la homo kiu plej profunde influis la penson kaj personecon de José Martí estis la poeto, verkisto kaj pedagogo Rafael María de Mendive, (1821-1886). Mendive estis lernejestro de la lernejo kiun Martí ĉeestis kaj kiel bona pedagogo, li tuj kaptis la genian talenton de tiu akrapensa knabo. Ĉar Mendive mem, kiel preskaŭ ĉiuj tiamaj kubaj intelektuloj, favoris la sendependecajn aspirojn de la kubanoj, li semis tiun idearon en la spirito de sia lernanto.

Jam en 1869, estante 16-jara knabo, Martí elpaŝis publike por la unua fojo, per letero sendita al eksa samklasano kiu ekservis en la hispana armeo, en kiu li akuzis tiun homon esti apostato.

Ĉar la tiamaj aŭtoritatoj hispanaj konsideris tion kiel insulton al la hispana superregado, Martí estis enkarcerigita, juĝita kaj kondamnita. Kiam iom poste, pro san-kaŭzoj li estis deportita al la metropolo, en fama broŝuro titolita *El presidio político en*

Cuba, verkita kaj eldonita en Madrido dum la jaro 1871, li priskribis la kruelecon de tiu sistemo kaj lanĉis sin al batalado por la kuba sendependeco, kiun nur lia morto povis malhelpi.

Dum sia tempesta kaj plurfacete unika vivo de apostolo konsakrita al la bono de



José Martí. Esteban Velderrama. Kolekto Centro de Estudios Marianos. (Fragmento).

Kubo, tri estis la ĉefaj direktoj de la politika penso de Martí. Unue, la sendependigo de Kubo el la hispana superregado; due, la tutamerikanismo, t.e., la plena integriĝo de ĉiuj landoj de Latinameriko; kaj trie, la kontraŭimperiismo, t.e. la batalado kontraŭ la tiam kreskantaj influo, agresemo kaj avido de la jus naskiĝanta usona imperiismo.

Post la periodo 1868-1879, kiam finiĝis la unuaj kubaj militoj por atingado de la sendependeco el Hispanio, Martí plene dediĉis sin al organizado kaj amasigo de la disaj revoluciaj fortoj en vera fasko kiu povus antaŭenigi – kaj ne nur antaŭenigi, sed ankaŭ sukcesigi – la kubajn aspirojn.

El la ekzilo en Usono, Martí persiste klopodis kaj fine atingis la celon unuigi la kubajn sendependeculojn por laboradi, silente sed efike, por la sendependeco. La militon, kiun li antaŭvidis neevitebla, Martí absolute ne volis regata de malamo. En sia fama parolado en la Kuba Liceo en Tampa, Usono, la 26-an de novembro 1891, li eldiris frazon kiu enhavas la kvintesencon de lia penso en rilato kun la sendependeco de Kubo: "Mi volas, ke la unua leĝo de nia respubliko estu la kulto de kubanoj al la plena homa digno."²

Ĉu eblas homa digno kie regas malamo? Certe ne, kaj tion bonege komprenis Martí. En alia ne malpli konata tiutempa parolado, t.e., tiu kiun li eldiris la 10-an de oktobro 1889 en Hardman Hall, Novjorko, Usono, jen kernaj vortoj kiuj bildigas la personecon kaj pensmanieron de Martí: "...ni kompletigu la verkon de la revolucio per la heroa kaj evangelia spirito per kiu ĝin iniciatis niaj gepatroj, kun ĉiuj, por la bono de ĉiuj."

Per tiuj vortoj, por la bono de ĉiuj, li konturigis sufiĉe hele la sentojn kiuj bolis ĉe lia koro, kie neniam malamo nestis.

Martí sciis kaj klarege vidis, ke la kuba sendependeco ne povus esti ligita al mala-

mo, kaj tial li pledis por la partopreno de ĉiuj, por ke ĉiuj povu tiri profiton el la rikolto de la suvereneco. Plenan konfirmon de tiu nia aserto donas al ni li mem en la sama parolado en Hardman Hall, kiam li diras: "...ni estas homoj, krom esti kubanoj, kaj ni batalas por la deĉo kaj feliĉo de la homoj!"

Se li pensis kiel kubano, pri la sendependeco de la hejmlando, ankaŭ la giganta politika vizio de José Martí etendiĝis al la tuta Ameriko, ĉefe al Latinameriko.

Heredinto kaj daŭriganto de la politika penso de Simón Bolívar, la venezuelano prave nomita la liberiganto de Ameriko, Martí antaŭvidis per klarega penso la estontecon, kiu atendas niajn landojn, kaj donis britajn konsilojn por efektivigo de la hodiaŭ tiom urĝe necesa latinamerika integriĝo.

En *Informe a la Conferencia Monetaria Internacional de Washington* (Informe al la Amerika Internacia Monkonferenco de Vaŝingtono), la 30-an de marto 1891, Martí skribis frazojn, kiuj hodiaŭ estas tiom aktualaj, ke apenaŭ eblas ilin forgesi: "Ameriko devas okazigi ĉion, kio proksimigus la popolojn, kaj abomeni ĉion, kio disigus ilin. En tio, kiel en ĉiuj homaj problemoj, la estontecco estas la paco."

Jam antaŭ pli ol jarcento Martí kribis la estontecon kaj antaŭvidis la bezonon de unuiĝo de ĉiuj landoj de Latinameriko por kunlaborado en paco, kiu utilis al ĉiuj egale.

Pri la neceso konservi kaj flegi nian identecon, en 1891 en verko, kiun li titolis *Nuestra América* – kaj vidu, ke la titolo estas elokventa per si mem – li skribis: "Engrefiĝu en niajn respublikojn la mondo, sed la trunko nepre estu tiu de niaj respublikoj."³

Kion diri pri tiu penso? Ĉu la kunsidoj de ŝtatestroj de Latinameriko, kiun partoprenas ankaŭ Hispanio kaj Portugalio, ne estas klopodo konkretigi tiun vizion de Martí, kiu pledis por la integriĝo de Latinameriko al la monda fluo?

Hodiaŭ, kiam ĉiutage pli kaj pli la riĉaj landoj de la evoluinta mondo strebas vori la malpli evoluintajn landojn, altrudante al ili ekonomiajn modelojn, kiuj neniel utilas al niaj landoj, la pensoj de Martí vibras multe pli forte en la koroj de ĉiuj latinamerikanoj, kiuj amas niajn landojn kaj laboras por la estontecco.

Kiel logika konsekvenco de la du jam pri-traktitaj facetoj de la politika penso de nia Nacia Heroo, ekestis ĉe li la tria plej gravalia kontraŭimperiismo.

Usono, kiu jam en la 80-aj jaroj de la 19-a jarcento montiĝis ambicia imperio, prezentiĝis tre klare videbla antaŭ la akra rigardo de Martí, kiu loĝis tie dum pluraj jaroj. Kiam oni trastudas lian verkaron, facilas trovi la klaregan bildon, kiun Martí formis al si pri tiu burĝonanta imperio.

Dum lia restado en tiu lando, li povis ne nur sekvi la evoluon de la naskiĝanta imperio. Martí ankaŭ povis antaŭvidi la rolon, kiun ludos Usono en la posta evoluo de nia kontinento, kaj en sia famega, nefinita letero al Manuel Mercado, datita la 18-an de majo 1895, 24 horojn antaŭ sia morto kaj kiun la historiistoj konsideras nepre trastudinda, li nete donis la plej precizan bildon pri la imperio: "...Jam mi estas ĉiutage en danĝero oferi mian vivon por mia lando kaj por mia devo – ĉar mi tion komprenas kaj havas fortojn por tia entrepreno – malpermesi en tempo per la sendependeco de Kubo, ke Usono etendiĝu tra la Antiloj kaj falu kun tiu plia forto sur niajn landojn de Ameriko."

Estas vere mirinde, ke jam antaŭ jarcento oni povus legi tian priskribon de la fakta situacio, kiu nuntempe sufokas preskaŭ la tutan mondon, ne nur Latinamerikon. Kaj en la sama letero, kiun oni konsideras la politika testamento de Martí, li skribis: "...la vojo, kiun ni devas ŝtopi kaj per nia sango ni estas ŝtopantaj, tiun de la aneksado

de la popoloj de nia Ameriko al la Nordo agitata kaj sovaĝa, kiu ilin malŝatas.”

Kiel la posta evoluo de la historio en nia kontinento – kaj ne nur ĉi tie, sed ankaŭ pli larĝskale – pruvis, la agresemo kaj orgojto de Usono estis vera baro por la evoluo, sendependeco kaj fakta suvereneco de la popoloj.

Nia lando, kies historio estas plurilate unika, havis la ŝancon konkretigi en la praktiko la ĉefajn facelojn de la politika penso de José Martí. En la jaro 1953, ĝuste kiam oni celebris la centjaran datrevenon de lia naskiĝo, grupo de junaj homoj, kiun gvidis la plej elstara disĉiplo de Martí, Fidel Castro, iniciatis veran bataladon kontraŭ la tiama diktaturo, kiu dronigis Kubon en la teroron.

La nomata “Centjariĝa Generacio”, ĉar ĝi volis tiamaniere honori la memoron de José Martí, kiu estis la ĉefa inspirfonto por ili, atakis la kazernon Moncada la 26-an de julio 1953, komencante la Revolucian kiu fine donus al nia lando ties faktan kaj definitivan liberecon.

Kvankam ili estis tiam venkitaj kaj enkarcerigitaj, dum la juĝproceso, kiun ili devis alfronti, Fidel skizis en sia defendo, kiun oni konas sub la nomo *La historia me absolvará*,⁴ la programon de la Generacio kaj asertis, ke estis Martí, kiu gvidis lian idearon.

Post batalado, kiu daŭris preskaŭ ses jarojn, fine la 1-an de januaro 1959, la Centjariĝa Generacio sukcesis venki la tiranon per Revolucio, kiu fariĝis simbolo kaj lumturo por pluraj landoj kaj milionoj da homoj tra la tuta mondo.

Ĵeti rigardon al la kuba historio dum la lastaj 40 jaroj pruvas, ke en ĉiuj terenoj, ne nur en tiu de politiko, la instruoj de Martí estas esenca parto de la enlanda vivo kaj ke la programo, kiun Fidel skizis dum la proceso de la atakantoj al kazerno Moncada plene efektiviĝis.

Kubo estas ŝtato vere sendependa, kiu sekvas sian propran vojon sen timo al la minacoj kaj premoj de tiu fia imperiismo, kiun Martí tiom klare antaŭvidis.

Per daŭra kunlaborado kun ĉiuj landoj de Latinameriko, nia registaro faras ĉion eblan por la integriĝo de niaj landoj kaj la ĵus estiĝinta Latinamerika Fakultato pri Medicino, kie miloj da ĝejnuloj el nia kontinento studas por poste helpi la publikan sanon en siaj respektivaj landoj, eistare atestas la veron nekontesteban de niaj vortoj. Fine, nia agado ĉe UNO kaj pluraj aliaj internaciaj organizaĵoj en defendo ne nur de nia rajto, sed ankaŭ de la rajto de la malpli riĉaj landoj kontraŭ la usonaj avido kaj agresemo tre klare pruvas al la mondo, ke la kontraŭimperiisma penso de José Martí estas viva en nia lando.

Mi esperas, ke per tiu ĉi prelego vi povis ricevi sufiĉe klaran bildon pri nia Nacia Heroo kaj pri lia politika penso kaj firme kredas, ke la plej taŭga maniero ĝin fini, estas citi penson lian, kiu estas kvazaŭ spegulo ne nur de nia socio, kie ĝi cetere plene efektiviĝis, sed ankaŭ de la estonteco, kiu pli frue ol oni povus imagi, vidos, kiel tra la tuta mondo realiĝos, kiel profete esprimis Martí: “Venas sur nin, antaŭenigita de la laboristoj, nova universo.”

JUAN LÁZARO BESADA TOLEDO

¹ Prelego prezentita dum la 12-a Konferenco de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK), Havano dec. 1999 – jan. 2000.

² Ĉiuj citaĵoj laŭ *Obras Completas de José Martí*, edición popular conmemorativa del cincuentenario de su muerte, Editorial Lex, La Habana. 1948.

³ Citita laŭ *Mia Ameriko*, [tr. el la hispana Orlando E. Raola]. Pensema Publishing Company, Berkeley, Kalifornio, 1996.

⁴ Publikigita en esperanto: *La historia absolvos min*, Eldonejo José Martí. Havano 1984.

Por daŭra perfektigo de niaj aranĝoj

Kun la tempopaso, kulturaj aranĝoj fariĝis tradicio en nia movado kaj ili ja estas esenca parto en la agado de niaj filioj kaj grupoj pro la fakto, ke ili plifortigas sociajn rilatojn inter la membroj, kompletas la lecionojn, venigas novajn membrojn al la vivo de la Asocio, ebligas al kelkaj membroj diversmaniere montri sian talenton, pretigas la esperantistaron por naciaj kaj internaciaj eventoj kaj vivigas la Asocion.

Se la organizantoj de niaj kulturaj aranĝoj, ĉefe la respondeculoj aŭ aktivuloj pri kulturo, deziras ke tiaj aranĝoj daŭre plibonigu kaj pliriĉigu la esperantistecon de niaj movadanoj, ili devas klopodi, ke ili ĉiuj estu klerigaj, portu iun mesaĝon al la ĉeestantoj kaj plialtigu iliajn kulturajn konitaĵojn. Post la aranĝo ĉiu partopreninto devas porti hejmen iun novan kaj interesan mesaĝon kaj devas pli konscii pri la bezono pli lemi la lingvon, ties historion kaj kulturon kaj pli aktive partopreni la asocian vivon.

Por atingi la supre menciitajn celojn, ni rekomendas inkluzivi laŭeble kelkajn el la jenaj programeroj en la diversajn aranĝojn.

- Informo pri novaĵoj. Oni informu pri okazintaĵoj kaj okazontaĵoj de la movado en kaj eksterlande.

- Prelego, parolado, konversacio aŭ ronda tablo pri iu E-temo, pri la vivo de iu elstara esperantisto, pri iu E-libro aŭ alispeca materialo, pri iu E-organizaĵo, institucio, loko, evento, ktp.

- Informo pri la historio kaj kulturo de la internacia E-komunumo pere de kelkaj rubrikoj; nome: *Kio okazis? Ĉu vi scias, ke... Pri kio temas? Pri kiu temas?, Kie okazis...?* ktp.

- Informoj pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko tra la mondo.

- Legado de interesaj aŭ gravaj dokumentoj, artikoloj aŭ alispecaj materialoj.

- Legado de proverboj, pensoj, ŝercoj, skeĉoj, teatraĵetoj, ktp.

- Kantoj, deklamado, surscenigo de teatraĵoj, skeĉoj, dancoj, ktp.

- Konkursetoj por premii al kiu plej bone legas poemon, monologon, ktp.; al kiu plej bone scias pri la E-historio kaj kulturo; al kiu plej bone kantas, dancas, ktp.

- Lingvaj klarigoj.

- Diverstipaj ludoj por partoprenigi la ĉeestantojn; ekzemple: *Malkovru la vorton, la objekton, la frazon*, ktp.

- Tradukado.

- Modparado.

- Tombolo.

- Libroaŭkcio.

- Libroservo.

- Lotumado.

- Oni ankaŭ povas inviti neesperantistojn por ke ili prelegu, muziku, kantu, deklamu, dancu, ktp. Tiel ni ligas la Asocion al la kultura vivo de la komunumo kaj profitas ties potencialon.

Eblas aldoni pliajn programerojn, sed tio dependas de la iniciatemo kaj deziro de ni ĉiuj. Ni esperas ke vi profitu la enhavon de tiu ĉi artikolo por pliriĉigi la vivon de la movado kie ajn vi estu.

Memoru: Vi estas Esperanto. Vi estas KEA.

1 + 1 = Movado.

Ne malpli, sed pli!

JULIÁN HERNÁNDEZ ANCULO

Julio Martínez kaj Andrés Rodríguez

Kiel preskaŭ ĉiam, mi malfruis... Kial mi ne sukcesas ĝustatempe veni? Jam la intervjuotoj atendadis min de duonhora, sed ĝentile senkulpigis min. Vi scias, la transportaj problemoj...

Ho, jes. Mi ankoraŭ ne prezentis ilin. Temas pri du veteranaj (tute ne oldaj!) esperantistoj: Julio Martínez Fiallo kaj Andrés Rodríguez González.

AGF: Nu, bone, la unua demando ĉiam rilatas al esperantistiĝo, ĉu ne? En viaj kazoj...

JMF: Mi ekinteresiĝis pri Esperanto en 1966, kiam la ĵurnalo *El Mundo* (La mondo) aperigis anoncon pri perkoresponda kurso de Carlos Cabrera, aktivulo de la tiam disa kuba esperantistaro.



Andrés Rodríguez en 1983, dum la prezento de nova Esperanto-eldonaĵo, ĉe la plej granda Havana librovendejo La Moderna Poesia. Foto: Arkivo KEA.

ARG: Mi unue aŭdis pri Esperanto en filmo, kie oni menciis iun E-instruiston...

(AGF),(JMF): Ne diru! Kiu filmo?

ARG: "El halcón maltés" (La malta falko), mi kredas... poste en la filmo "Seducida y Abandonada" (Delogita kaj forlasita), oni ankaŭ menciis Esperanton. Mi esploris la aferon kaj eksciis pri kio temis. La ideo interesis min...

AGF: Kaj vi tiam komencis lerni...

ARG: Ne, ĝis 1972, kiam post E-ekspozicio diskonigita de Radio Reloj (Radio horloĝo), mi havis ŝancon ĉeesti kurson.

AGF: Do, Julio ŝajnas esti la plej veterana. Atentu ke mi ne diras olda, sed veterana...

JMF: Sed en vero mi ne finis la kurson tiam... mi rekomencis la lernadon en la jaro 1973, kiam Carlos Cabrera ekinstruis en la teatro de mia laborejo, la Mineja Entreprena Unuiĝo, ĉe la adreso Empedrado kaj Mercaderes. Poste ni devis translokiĝi al Lonja del Comercio, pro neebleco plue uzi la teatron. Tiam la grupo estis konata kiel Havana Esperanto-Rondo. Mi finis la kurson en la konstruaĵo de la Universitata Fakultato pri Ekonomio (vidalvide al la glaciaĵejo Coppelia) en 1974. Iom poste oni okazigis la unuajn elektojn en la biblioteko Rubén Martínez Villena...

AGF: Sufiĉe nomada kurso. En 1974 vi estis elektita vicprezidanto de tio, kio de tiam nomiĝis Kuba Esperanto-Asocio, ĉu ne Andrés?

ARG: Jes, kaj prezidanto estis Oscar Otero... Mi rememoras, ke foje mi estis invitita prelegi pri Esperanto en la Nacia Biblioteko kaj mi "eskapis" el mia laborejo ne sciante, ke la novaĵo aperos en la ĵurna-

loj... kompreneble mia superulo skoldis min... aĥ, tiaj tempoj...

AGF: Same okazis al mi dum SAEST, antaŭ kelkaj jaroj. Mi inventis "malsanon" por havi permeson, kaj poste oni vidis min televide. Julio, daŭrigu. Kio poste? Ĉu vi ne havis ŝancon kontakti kun eksterlandaj esperantistoj?

JMF: Mi daŭrigis la korespondadon kaj aktivis... En 1976 venis en Kubon la sovetiano Eduard Raus, korespondamiko mia. En 1977 venis vjetnamano Nguyen Vanh Kinh, invitita de la Kuba Pacmovado, kaj li petis renkontiĝi kun kubaj esperantistoj. Bona afero, kiu atentigis pri Esperanto al homoj, kiuj alikaze eĉ ne imagus pri ĝia ekzisto, mi diru. Li renkontiĝis kun Andrés kaj René Valdés. Poste, la 16-an de junio 1979, Kuba Esperanto-Asocio estis oficiale fondita, kaj oni elektis al Andrés prezidanton, dum mi estis sekretario pri edukado. (Julio montras ekzempleron de *Esperanto*, kie aperis en marto 1980 artikolo pri la vizito de nederlandaj esperantistoj, kun fotoj.)

AGF: Jen vi, Julio! Kaj ankaŭ Fernando Paredes, delegito kaj ĉefdelegito de UEA dum multaj jaroj. Kaj vidu, oni mencias la kursojn: "...Kursfina aranĝo... ĉirkaŭ 500 gelemantoj ricevos sian ateston." "La 11-an de februaro komenciĝos la nova kurso por la tri niveloj. En ĝi partoprenos pli ol 1000 gelemantoj." "En la artikolo oni ankaŭ mencias samideanon Juan Lázaro Besada, tiam 26-jara lernanto, flua parolanto de la lingvo... Mi komencis lerni Esperanton en tiu kurso. Kaj kelkajn lekciojn mi ricevis de Besada mem. Aĥ, la klasoĉambroj estis ĉiam plenplenaj, kaj dum la oftaj elektroprovizaj interrompoj ni daŭrigis la lekciojn uzante petrollampojn... ni lernis en elementa lernejo, dumnokte.

ARG: La tiama Direktoro pri Edukado en Municipio Centro Habana multe apogis nian laboron.

AGF: En la sama jaro mi finis studojn kiel instruisto pri kemio kaj iris labori al la Insulo de la Junularo. Mi rememoras, ke fininte la unuan nivelon, miaj gepatroj, ankaŭ lernantoj, serĉis por mi korespondamikon, ĉar tiam en la Insulo ne facilis esperantumi. Tiel mi konis perletere al Alberto Fernández-Calienes Barrios. Dum unu marŝo kontraŭ la militbazoj usonaj, mi vidis de malproksime afiŝon en Esperanto. Mi supozas, ke ĝi estis portita de Torres Lima, tiama aktivulo. Mi neniam renkontis lin...

Mi memlernis helpe de la broŝuroj de la dua nivelo. Kiam venis la ekzamena tempo, mi petis forpermeson en la lernejo kie mi laboris kaj vojaĝis al Havano ekzameniĝi. Ekzamenis min Andrés, kaj mi preskaŭ fiaskis...

ARG: Vi havis nenian ideon pri la akuzativo, mi rememoras...

AGF: Tiam oni estis jam ricevinta la sidejon en la stratangulo Neptuno kaj Industria, ĉu ne? Tiu sidejo fariĝis simbolo dum multaj jaroj... ĝi ja estas en tre centra loko de la ĉefurbo...

JMF: Ne, ni ricevis ĝin en la jaro 1982. Tie ni akceptis kelkajn eksterlandajn esperantistojn. Oni ankaŭ devintus transdoni al ni aŭtomobilon, kiun ni neniam vidis... okazis, ke nia tegmenta organizaĵo estis la Akademio de Sciencoj, kaj iu tie pensis, ke la aŭto apartenis al la Akademio... Mi restis en la estraro ĝis 1986, kiam mi devis rezigni pro malsano. De 1985 prezidis la Asocion Jesús Castillo, kiu en 1989 petis ke mi helpu al Niurka Alonso, prezidantino de la Havana provinca filio. Do, mi ree laboris, ĉifoje ĉe la Provinca Estraro, kiel estrarano pri financoj.

AGF: Jam vi apartenis al la Metiejo (Esperanta Literatura Tradukmetiejo, ELT), vi du... kaj mi ankaŭ. Vi, Andrés, kaj Arnoldo Águila havis la ideon krei studgrupon por tradukado en kaj el la internacia lingvo. Mi

memoras, ke tio okazis aprile de 1989. Mia frato (neesperantisto) ĉeestis la sesiojn de sciencfika literatura grupo en municipo Plaza, kaj tie Arnoldo sciigis lin pri la ideo. Ni renkontigadis ĉe UNEAC, (Kuba Unuiĝo de Verkistoj kaj Artistoj).

ARG: Estis bone labori en la Metiejo... Oni verkadis kaj submetis ĉion al kritiko el lingva kaj literatura vidpunktoj.

AGF: Ne nur literaturo, kvankam ĝi kompreneble estis la ĉefa afero... Julio pretigis kurson pri Hato-Jogo en Esperanto. Ĝi ankoraŭ atendas eldoniston. (Ridetoj). Al la Metiejo apartenis samideanoj Pérez Pérez, Federico Torres, Conrado Carrodegua, i.a. Ni partoprenis eventojn pri literatura tra-

dukado en UNEAC, kaj Arnoldo estis premiita en unu el ili.

ARG: Kaj la eventon Expolingua '92...

JMF: Ne forgesu la Universalan Kongreson en Havano. Ni prezentis la flugfolion *ELT Salutas* kun traduko de novelo kaj poemoj. Arnoldo ricevis mencion en la Belartaj Konkursoj pro la eseo "Poezio ne estas matematiko". Temis pri la unua kubano...

AGF: Tiam mi komencis sendi kunlaboraĵojn al *Kontakto* kaj *Monato*. Bedaŭrinde la "speciala periodo" konspiris kontraŭ ĉio, kaj post kelkaj jaroj la Metiejo malaperis... Multfoje mi revis pri revivigo de la Metiejo, sed ĝis nun... Kiom da rememoroj... Dankon, fratoj!

ALBERTO GARCÍA FUMERO

Plia E-fako en biblioteko. Ĉifoje en Guantánamo

La 18an de oktobro 2002 la Provinca Grupo en Guantánamo inaŭguris E-fakon "Jemima Francis Beckett", (honore al memoriginda forpasinta esperantistino el nia urbo)




en la Literatura kaj Arta Halo de la Provinca Biblioteko "Polcarpo Pineda".

Partoprenis laboristinoj kaj la direktorino de tiu institucio, reprezentantoj de Ministerio pri Kulturo, Komunisma Junularo, Junpionira Organizaĵo, kantaŭtoro Josué Oliva, aliaj invititoj kaj dudeko da geesperantistoj. Alberto F. Calienes, en reprezento de

la Nacia Estraro, transdonis librodonaĵojn de KEA, kaj nia speciala gasto s-ro Eddy Raats (Belgio) donacis i.a. ekzempleron de la ĵus eldonita *Cisko kaj Vinjo. La Brusela Bubo*.

En la festparolado oni emfazis, ke la celo de tiu inaŭguro estas ĉefe faciligi la kulturan pliriĉigon al la esperantistaro kaj al la neesperantista publiko, instigante ĉiujn daŭre uzi tiun eblecon, kie krom legi eblas aŭskulti E-materialojn, per magnetofono kaj disko-sonilo.

RAÚL SÁNCHEZ GUILARTE



MEMDIALOGOJ


Tiuj, kiuj konas de sufiĉe longa tempo samideanon Juan Lázaro Besada, scias ke literaturo estas unu el liaj ĉeftemoj kaj motoroj en la vivo. En la hispana kaj en la

internacia li jam de jaroj kultivas la literaturan grundon rikoltante plensukajn fruktojn. Noveloj eseoj kaj poemoj kvazaŭ fontis el lia plumo, kaj estas donintaj al li la solidan rekonon inter ni kiel verkisto. Kaj denove ni ricevas kontribuon el lia kreivo: bedaŭrinde ne temas pri esperantaĵo, sed la verko ja validas por ni, eĉ se ne temas pri "io en Esperanto". La volumo *Soliloquios* (Memdialogoj) montras la profesie formitan stilon de matura poeto, tiom per la trafaj esprimoj kaj bildoj proponitaj, kiom per la elektitaj temoj. Kvankam mi ja sciis, kiom ĝisfunde kaj pacience li prilaboras la frazojn serĉe de la vorta oro, la rezulto de li atingita surprizis min. Tre agrable. Perdoj kiel "Pento" (*mi pentas, ke mi ne estis tiom malpura / kiom amo postulis en ĉiu frumafeno...*) aŭ tiu sur paĝo 59 (*turoj de l' koro / levu vian esperon en standardo de revo...*) ne facilas trovi. Jen plia ekzemplo: *Estu kaj vento kaj heliko en la deliro / kiu malfermas la plenplenan vejnon / la torento de tiu ĉi vorto / je fantazio salega...* Inter rimaj kaj senrimaj versoj troviĝas ankaŭ interesaj esploroj pere de malnovaj poemstrukturoj, kiel rondelo, ekzemple, kaj ankaŭ epigramoj.

Tamen, ne unuavide diveniĝas la sendube pacienca laboro malantaŭ la freŝeco de la rezulto. Samideano Besada, ĵus diplomigiĝinta pri Humanismaj Studoj ĉe la Centro "Fray Bartolomé de las Casas", donacas al ni, pere de tiu ĉi libro, veran frandaĵon kiun mi rekomendas al literaturamantoj.

TINEO

Anonco



Venu
Via
Regno

Ni proponas senpagan

**BIBLIAN
STUDKURSON**

Se mankas al vi Biblio,
ni, senpage provizos Bibliion.

Via Vorto estas lumilo
por miaj piedoj
Kaj lumo por mia vojo.
Psalmo 119:105

INTERNACIA BIBLIO-MISIO
50 Wissage Road, LICHFIELD
WS13 6SW Anglio.

Zamenhof aŭdiĝis en Yacabo ĉemare

De la 11a ĝis la 14a de decembro, en la orienta provinco Guantánamo, esperantistoj el 5 provincoj renkontiĝis en bela kampadejo ĉe la marbordo kies nomo, aborigena, estas Yacabo, el la samnoma rivero tie fluanta al la maro.

La evento fariĝis jam tradicia, ĉar dum kelkaj jaroj ĉirkaŭ la Zamenhofa Tago la provinca grupo de Guantánamo organizas nacian kunvenon, ne tre formalan, sed tute seriozan ekde organiza vidpunkto, por pri-trakti diversajn temojn ligitajn al la figuro de la iniciatinto de Esperanto.

Ĉijare partoprenis entute 22 esperantistoj el diversaj regionoj, nome Santiago de Cuba, Holguín, Guantánamo, Sancti Spiritus kaj Havano. Inter la programeroj estis ronda tablo pri Zamenhof, la homo; kaj Zamenhof kiel lingvo-kreinto. Krome, oni spektis la unuan parton de la videobendo "Mazi en Gondolando" kaj la brazilan videobendon de Sylla Chaves kies nomo estas "Plur-specaj eroj por artaj vesperoj", per kiu la esperantistoj kunkantis surbaze de teksto skribita sur la bendo. Temis pri bela prezentado kiun multe ĝuis la partoprenintoj.

Ankaŭ okazis distraj programeroj ĉe la bela plaĝo ĉirkaŭata de montaroj kaj vizitoj al najbara vilaĝeto kie la esperantistoj povis gustumi bonegan kokosakvon sub la arbaro ĉe la kamparanoj en bela natura pejzaĝo inter maro kaj montoj.

Vespere okazis kultura programo kun esperanta muziko, poemdeklamado, pupteatra prezento de Bona Amiko, pupo vivigata de Isnel Pupo, entuziasma esperantisto de Holguín kun la helpo de infano kiu sin preparis por la okazo; oni ankaŭ ĝuis reprezenton de monologo fare de Yoandra Rodríguez, nia juna aktorino kaj esperantistino el Sancti Spiritus, kies filo Norbertido, denaska esperantisto 7-jara regalis nin per bela flua parolado kaj disertacio pri meteoritoj kaj konstelacioj. En tia etoso okazis nia Zamenhofa omaĝo en la orienta ekstremo de Kubo.

La fermo okazis sabate matene: mi mem iom prelegetis pri Zamenhof kaj lia parolado dum la Unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo sur Maro en 1905 iom emfazante la signifon kaj simbolon de tia unua parolado kiam unuafoje ariĝis esperantistoj por "doni al si reciproke la manojn". Ni ĉiuj eliris el tia renkontiĝo kun la sento ke tia unua parolado de Zamenhof estas io valida kaj grava por la estonteco de nia movado, tiel ke estas nia celo stimuli tian homaranan kaj solidarecan senton priskribitan de li, inter niaj samideanoj. Gratulindas la iniciatemo de la teamo de Guantánamo kiu estas modelo de kunlaboro kaj esperantismo en nia lando.

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

*Feliĉan Kristnaskon
kaj sukcesan novan jaron!*

Kuŝe, side kaj ...

– Diru, PIVulo, ĉu estas korekte diri: "la problemo estas en tio, ke...?"-Oni diris al mi, ke tiu dirmaniero ne estas korekta...

– Kia! Ĉu hazarde oni ne komprenis vin? Komprenebleco devus esti via unua zorgo. Kvankam veras, ke kutimo kaj la uzo flanke de bonaj aŭtoroj foje trudas esprimojn, kiuj je la unua penso ne venas al la kapo...

– Ĉu eblas, ke formoj, ni diru, "strangaj" entrudu sin en lingvon centelcente logikan, kia estas Esperanto?

– Nu, el kie vi tiris, ke Esperanto estas 100% logika? Se tiel estus, Esperanto ne apartenus al la homaj aferoj. Ĝi estus afero je robotoj... mi ĉiutage dankas al Dio, ke Esperanto estas sufiĉe homa. En tiuj ĉi tempoj je aŭtomatigo, robotigo, tutglobigo...

– Ne ŝercu, PIVulo!

– Jes. Mia opinie granda parto de la kreivo de Eo kuŝas en tio, ke oni devas "interpreti" kaj kunmetaĵojn kaj kutimajn esprimojn...

– He! Vi uzas la esprimon "kuŝi en tio, ke..." Ĉu tiu esprimo estas pli eleganta, pli "esperanta"?

– Jes, eble ni povus tion diri. Kelkfoje, sed ma pli ofte, oni ankaŭ uzas la esprimon "sidi en tio".

– Sidi, kuŝi... Jes, eble vi pravas, kaj Esperanto havas sufiĉan dozon da subjektiveco... mi ne unuavide komprenas, kiel kialo aŭ problemo povas "kuŝi" aŭ "sidi" en aŭ sur io. Eble pro senmoveco, pro daŭro, mi ne scias. Same oni parolas pri "sidejo" de la Asocio, kvankam la Asocio en vero neniel sidas, ĉu ne?

– Sidas ni, la asocianoj, kompreneble. Kaj kelkfoje ni ĉiuj sidas tro longe, anstataŭ iri

uzi Esperanton surstrate, ĉiutage, hejme. Sed tio estas alia afero, ne gramatika...

– Nu, kia afero... kiam ĉi-nokte mi kuŝos surlite, mia patrino, kiu ĉiam plendas pro mia supozata pigreco, vere povos diri, ke mia maldiligenteco kuŝas en tio, ke mi tro kuŝas... kiel vi kuŝas? Sur lito aŭ en lito?

– Nu, mi supozas, ke sur lito. Surlite ni dormas. Ĉu eblas kuŝi "en" lito?

– Laŭ *Plena Analiza Gramatiko*. (PAG), oni kuŝas en lito, se ĝi estas metita por dormo, kaj sur lito se oni ankoraŭ ne demetis la litkovrilon...

– Iru for, PIVulo! Ne ŝercu! Sed, nu, se oni pensas iomete pri la afero... por dormi oni devas sandviĉe kuŝi inter littukoj, kaj por nedormo mi kutime ne demetas la litkovrilon... tio ŝajnas al mi iom ekstravaganca sed, jes, eble...

– Same oni sidas en lito, se la piedoj troviĝas sur la lito, kaj surlite, se ili restas alie, pendantaj... Oni sidas sur seĝo, sed "en" apogseĝo, brakseĝo, fotelo, ktp...

– Se paroli pri sidado... kiam oni devas uzi "sidi" kaj kiam uzi "sidiĝi"? Mi ĉiam dubetas...

– Rememoru la signifon de "-iĝ". "Restu side" dirus vi, alveninte al loko, kie amikoj sidas, ekzemple dum asocia kunsido. Ili kompreneble ne devus "sidiĝi", ĉar ili jam sidas. Vi povus "sidi" (resti side) dum horoj, sed mi forte dubas, ĉu vi sidiĝos dum eĉ duonhoro...

– Vi kaj via PAG! Kia paro! Onidire, via kapkuseno estas PIV, kaj la matraco estas PAG. La demando estas: ĉu vi kuŝas "en" aŭ "sur" via gramatika matraco? PIVulo



21a -27a de marto 2004
Havano, Kubo


**Kia Esperanto-movado
por Ameriko?**



QUINCO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo
Telefonoj: +53(7)40 4484; 53 9102 Faks: 33 8729
kubesp@enet.cu



0215

34/6 02/15

Handwritten notes and signatures, including '18-3-03' and 'Javier Ramos'.

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro